

N. N. 11,

Vaga kanto

tradukita de Ludwig Emil Meier

1. L'antaŭtagmezon tutan mi
Studadis kun fervor',
Nun posttagmezon ĝojos en
Bierejo mia kor'!
Pli frue mi ne lasos ĝin,
Ol vokis la meznokto min.
Viválllerallál-lerálllerallá,
Viválllerallálllerallá!

2. De l'viv' plej granda ĝojo jen
Do estas am' kaj vin',
De l'amatino ĉirkaŭpren'
Sentigas princo min!
Kaj ĉe hordea suko eĉ
Mi revas laŭ kronita reĝ'!
Viválllerallál-lerálllerallá,
Viválllerallálllerallá!

3. Ja homo sen de am' inklin'
Nek vinon amantul'
Neniam amikigos min
Nek estos ajn karul'.
Similas vivo tia nur
Malbonan kampon sen kultur'!
Viválllerallál-lerálllerallá,
Viválllerallálllerallá!

...

4. Jam ofte pensis mi, pro ĉiel'!
 Ke de l'Kreinto do
 Pri soifo estas la kamel'
 Tre favorata, ho!
 Barelon kiel ventro ĝi
 Enhavas per naturmagi'!
 Viválllerallál-lerálllerallá,
 Viválllerallálllerallá!

5. Ĉu - kien mia - scias vi -
 Kompreno iris for?
 Ebrie sentas preskaŭ mi,
 Batadas mia kor'.
 Okulo surda, muta naz',
 Senvida lango - stranga kaz'!
 Viválllerallál-lerálllerallá,
 Viválllerallálllerallá!

6. Ho, mastro, unu glason nur,
 Enverŝu sen envi'!
 La ŝuldon skribu al la mur',
 Jen mia garanti':
 Por la pruntita biero ĉi
 Prezentas mian ĉapon mi!
 Viválllerallál-lerálllerallá,
 Viválllerallálllerallá!

...

*Traduko de la Germana poemo "Studentenlied" de N. N. 11 en Esperanton de LUDWIG EMIL MEIER (*1847-02-16 – †1919) en 1907.*

Arg-389-766 (2007-03-18 11:59:11)

La originan germana-lingvan tekston de tiu ĉi kanto mi, Manfred Retzlaff, elprenis el la retejo de sinjoro Frank Petersohn <http://ingeb.org/Lieder/ichhabde.html>. Tie estas indikite, ke la dua kaj la tria strofoj estas antaŭ la jaro 1794 verkitaj de Joachim Perinet (1765-1816). Vidu ankaŭ: <http://www.markomannia.org/index.php?target=liederbuchlied&liedid=284>. La esperantigon mi trovis en la kant-libreto "Esperantista kantaro", kolekto unua: Germanaj kantoj popolaj kaj studentaj, Esperantigitaj de L. E. Meier, verkisto. La kantlibro estas eldonita en 1907 de la eldonejo Hans Theodor Hoffman, Berlin W 35, Steglitzer Straße 44. (Sur la paĝoj 9 kaj 10 de tiu kant-libreto estas intershanĝitaj la strofoj 3 kaj 4, kompare al la origina germana teksto. Mi re-interŝanĝis tiujn.) La melodio de la kanto estas indikita en ambaŭ retejoj en formo de midi-dosiero.